



FN PER ANC 47

ESPERANTO NORMANDA BULTENO

.unuigo de la normandaj esperantistoj

TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.

de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE.

AŬTUNO 1986A. - VINTRO 1986A - 1987A. (Nº. 70A - 71A NOVA SERIO).

n° 155
156

* REDAKTAS : Annie GAILLARD, 4 rue Louis Jovet

* 76800 ST ETIENNE DU ROUVRAY - Tel. 35-65-10-11

* Eldonita, ekspedita de :

* UNION des ESPERANTISTES DE NORMANDIE. C.C.P. n° 283 40 H ROUEN

* KOTIZOJ : Minimuma kotizo : 40 F. Subtena ek de 60 F.

* Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno, sen membreco : 40 F

* "La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj

* artikoloj"

NIA BULTENO

NI DECIDIS EN PORT-BAIL LA REGULAN APERADON DE NIA BULTENO.

TIU-ĈI NUMERO ESTAS LA UNUA FARITA DE LA NOVA SKIPŬ. KVANKAM

SIMPLA, NIA BULTENO NE ESTAS FACILE FAREBLA KAJ ĜI NECESIGAS MULTE

DA TEMPO. PRO TIO NI PETAS VIAN INDULGON SE VI KONSTATAS KELKAJN

NEKOREKTAĴOJN. NUN, NI ATENDAS VIAJN INFORMOJN KAJ ARTIKOLOJN POR

LA VENONTA KIUN NI PRETIGOS DUMSTAĜE EN ROUEN, LA 11AN&KAJ 12AN DE

APRILLO. NI NE ESTAS CERTAJ KE LA SAMA SKIPO KAPABLOS APĚRIGI LA

SEKVANTAĴN. ESTUS BONE KE ALIAJ GRUPOJ PRIZORGU LA ELDONADON DE TIU

BULTENO KIU ESTAS NEPRE NECESA ĈAR ĜI ESTAS LA ĈEFA LIGILO INTER

LA MEMBROJ DE NIA UNUIGO.

UNE, KAJ NIA BULTENO DEVAS KONTRIBUI AL SUKCESO DE JUBILEAĴARO!

LA RUENA SKIPO.

ĜENERALA KUNVENO EN PORT-DES-ILES

2

Tamen, ĝi okazis tiu nia jara kunveno!!

Ni devas antaŭ ĉio demeti la ĉapelon antaŭ s-ro Pierre ROBIOLLE pro lia efika organizado (kiu aspektas al la partoprenantoj kiel "kompreneble natura") spite al senesperigaj cirkonstancoj, pro lia invito partopreni al liaj samfakaj simpatiaj fervojistoj, kiuj iel "savis la nombron"...

La VVF "PORT des ILES" estas agrabla loko por renkontiĝo, tre komforta ĉu por la dormo, la manĝo, la akcepto. Ni akcentu pri la senproblemeo de la travivado tie.

La turisma flanko ne estis bagatela. Kiu legis en la bulteno la pri skribojn de Pierre Robiolle pri la lokoj vizitotaj, jam havis antaŭ guston pri tio.

La ekskurso sabaton matagmeze, buse, travojis la ĉirkaŭaĵon, kaj ne eblas raporti pri la dumvetura atentigo pri vidpunktoj, kasteloj, nek surpaperigi la etoson dum, ekzemple, la vizito de la Trapista bieno: laŭ la diro de tiea preleganto "edzoj estas akceptataj por kelktaga ripoziga preĝotempo, dum kiu vi eltiras veran serenecon..." kaj dum tiu tempo, la Trapistaj administantoj ricevas de la edzinoj "dankokarton pro la ĝusta ili ... ripoza tempo ... "!

Instrua kaj memoriga estis la vizito en la "Muzeo regiona pri cidre" kie retroveblas por la tria aĝuloj, iloj uzitaj dum la junece epoko. Fabrikado de alkoholo estas interaliaj specialaĵo en Normandio: tial ni havis eblecon gustumi Kalvadoson, kaj ties junan idon: "Pommeau" (pom-aperitivo). Tio okazos ĉe bonvolema fabrikisto kiu, kompreneble kaptis la okazon iom komerci.

Dimanĉe, je la fino del'mateno, la organizanto sukcesis prezenti al ni vizite, (kaj tio inter la Ĝenerala kunveno kaj la tagmanĝo), la preĝejon Notre-Dame de Portbail kaj la intereso vekan baktejon.

La saman tagon, posttagmeze, longa ekskurso kondukis ĝis Cherbourg kaj Nez de Jobourg (rankon al la sumo kiu briletos tiumomente). Tiu promeno permesis ekvidon al tiu ekstrema punkto de nia provinco.

Dum la sabata vesperaĵo:

nia amiko LtBEC, respondeculo en Francio pri la naturamika movado (Esperanto-sekcio), bildigis por ni la historion, evoluon, kaj vivon de tiu fratemeco kiu uzas esperanton kaj kies esperantlingva revuo (LA MIGRANTO) estas legata en dudek landoj.

Sekvis lin Yves kiu sciis paroli al ni pri la vivo de granda esperantisto

.../...
 kiu naskiĝis kaj vivis en tiu regiono. Temas pri Eugène ADAM, konata sub la nomo LAMMI (pro lia kutimo ofte kontraŭdiri, rebati). Elstara homo, li staris ĉe la pinto de la novaj ideoj; li profunde amis la popolon, la laboristojn, kaj konsciis pri la nepra bazo de klerigo, mamedukado de la homoj.

Poste, nia amiko Pierre JOUVIN, feliĉulo kiu partoprenis la kongreson en Pekino, fotis amase, iom pri la kongreso mem, sed ankaŭ pri la vivo de la ĉina popolo, kaj ankaŭ pri tipaj monumentoj oaj pejzaĝoj.

Kompreneble kun komentoj kiuj donis al ni ideon pri la kutimoj de la grandega nacio.

Kiel lasta punkto, (Sed jam, ve! la tempo malfruis) membroj de la grupo el LE HAVRE elmontris sian kutiman kombino: vendado de surpriz-kovertoj profite al la kaso...

ESTRARKUNVENO

Kelkajn semajnojn post la UNE-kongreso, oni decidis okaze de la estrarkunveno en Yvetot:

-la nova estraro konsistas el:

Prezidanto P. PUITIER

Vicprezidanto P. QUILLAUD

Kasisto P. QUILLAUD

Sekretariino S. CARON

Junulrespondeculo Y. NICOLAS

Euitenisto A. GAILLARD

Membroj P. MICHEL, C. ROUGET, C. DOMINGO, R. DELAUNAY.

-Bulteno:

Ĝi estos pli simpla sed devas aperi regule. Annie GAILLARD estos la tajpistino sed skipo el la rueno grupo prizorgos enpaĝigon kaj forsendon.

-Generala kunveno 1987a: ni kontaktos MFV en Etretat por ĝin organizi la trian kaj kvaran de oktobro 1987. Ni jam tie kunvenis en 1962 kaj ni ĉiuj estis tiam kontentaj. Ni esperu ke niaj klopooj sukcesos.

-KOIIZA ABONCO:

la minimuma kotizo estos nun 40,-f.

CAEN

Pro dramo kiu tuŝis lian familion, kaj ankaŭ la tutan esperantistaron, Sro Angenault ne gvidis kurson dum la tri lastaj monatoj de 1986.

Tiu kurso por komencantoj kaj progresantoj de nove okazos ekde Januaro, je la 17a vespere ĉiulunde en la jena loko :
Salle des Conférences SNCF (en la korto)
53, rue de la Gare
Caen.

Kiel antaŭe, la ĝenerala kunveno okazas la unuan lundon ĉiumonate, en tiu "Ĉambro de la Konferencoj".


Ni esperas ke la kursanoj kaj partoprenantoj estos multaj ! :-:--:

En Hérouville St Clair okazas koresponda kurso (tri lernantoj) kaj monata kunveno, ĉiumonate la duan merkredon je la 20 H 30a ĉe Yves Nicolas, 17-37 Quartier du Bois.

HEROUILLE

La urba gimnazio "Collège-Lycée Expérimental" de Hérouville, en decembro, organizis semajnon pri Utopio. Kadre de tiu semajno la dokumentaristino proponis al nia asocio prezenti Esperanton.

Mi ne intencis partopreni tiun semajnon por ke la lernantoj detale ekzameni tipikan utopiiston, sed por elmontri ke Esperanto de multaj jarekoj iĝis vigla lingvo uzata sur tre diversaj kampoj.



Kvankam la semajna temo malhelpis min ĉar ĝi similigis Esperanton al utopio, la kondiĉoj estis sufiĉe bonaj. La renkonto okazis dum 3 horoj, la 25 lernantoj el Dua, Unua, Bakjara klasoj, memvole partoprenis ĝin. Ili atente aŭskultis min, foliumis la dokumentojn, legis la pane-lojn kiujn mi alportis, kaj metis tre interesajn demandojn.

Iu lernantino notis la adreson de samideano (Normand (!) FLEURY) kiu loĝas en Montreal, kie ŝi venontjare reiros. Ĉu aliaj, iam, lernos Esperanton ? Ŝajnas al mi ke mi minime trafis mian celon : elmontri ke Esperanto vivas, ke la iama utopio de Zamenhof konkretiĝis kaj forte disvolviĝis-as.

Tiu interesa renkonto okazis pro tio ke de post du jaroj mi regule sendas dokumentojn de Sat-Amikaro kaj UFE al la liceoj de mia urbo. Neniu grajno perdiĝas !

:-:--:

Nia amiko Claude Rouget biciklas tra Eŭropo, li jam sendis novaĵojn el Hungario, Bulgario, Greklando kaj intencas viziti Israelon, sendube preferante la tiean vintran veteron al la normanda...

ALVOKO ! Ĉiuj junuloj kiuj deziras organizi regionan renkonton kontaktu Y. Nicolas 31 95 11 81

Dum septembro, la grupo faris iom da propagaado perafiŝe ĉe :
 komercistoj, faldfolioj, gazetartikoloj. Nova elementa kurso malferm
 iĝis en la junuldomo la 9an de januaro. Ĝi okazos ĉiuŝaŭde je la
 9.30 matene, sed bedaŭrinde partoprenas ĝin nur unu persono.
 Ekspozicio okazis en la junuldomo dum du semajnoj en Februaro.
 La tradicia reĝkuka festo ne okazis ĉi-jare ĝin anstataŭos komuna
 manĝo dum printempo por celebri la 100an datrevenon de la invento
 de esperanto. La dato de tiu manĝo ne estas ankraŭ definitive
 fiksita.

PRELEGOJ

D-ro Detlev BLANKE (GDR) prelegvojaĝos en Francio dum la dua duono
 de novembro 1987a. Inter alie li prelegos en ROUEN antaŭ universitatanoj
 kaj grupanoj pri mondlingvaj problemoj kaj esperanto-sciencoj. Laŭeble
 Normandaj grupoj ankaŭ lin invitu.

Aliĝu ĉe la organizanto:

FET, 179 rue Ordener, 75018 PARIS.



KULTURA ESPERANTO DOMO

Telefono : (41) 89.10.34

Postkonto Maison Culturelle
 Esperantiste, Nantes 448539 P

GRÉSILLON

F-49150 BAUGÉ

KULTURAJ ARANĜOJ 1987

Aprilo: 19/25: Internacia Renkonto de Infanoj
 Junio : 14/30 Internacia renkonto (kursoj, distraĵoj)
 Julio : 2/16 Prelegoj kaj Kursoj
 16/22 Altnivela Semajno
 Aŭgusto: 23/7-13/8 Someraj Kursoj
 13/30 Lernado, praktiko, turismo.

UN WEEK-END ⁶ A POITIERS.

Roman noir et science-fiction.

C'EST UNE VILLE AU PASSE RICHE ET A L'AVENIR PROMETEUR QU'A CHOISI LA SOCIÉTÉ ITALIENNE LITERATURA POIRO POUR SON SIXIÈME FORUM LITTÉRAIRE. PENDANT TOUT LE WEEK-END LES AUTEURS ESPERANTOPHONES RENCONTRERONT LEUR PUBLIC D'ABORD MAIS AUSSI LES CRITIQUES LITTÉRAIRES. CE FORUM PERMETTRA DE DÉCOUVRIR CET ASPECT SOUVENT MÉCONNU DE LA LITTÉRATURE ESPERANTOPHONE. UN PROGRAMME QUI VOUS PERMET DE DÉCOUVRIR AUSSI LA CAPITALITÉ POITEVINE.

Le programme :

Exposés et tables rondes avec les auteurs connus et leurs éditeurs.
Une soirée théâtre par TESPA. Une soirée cabaret avec Gianfranco MOLLE.
Un spectacle de marionnettes en espéranto par la troupe québécoise
LE NATOU NOIR. Un concert à la cathédrale par JOSQUIN DES PRES. Une visite guidée de la ville. Un service information et librairie pendant le week-end.

Le prix comprend :

Le programme (donné sous toute réserve), le logement en chambres confortables
la pension complète. Voyage en train de Rouen en option.
départ de Rouen le jeudi 30.04 à 16h50
retour à Rouen le dimanche 03.05 à 21h15

VALANO

SFEROJ

NEMERE

HARRISON

SILFER

DORVAL

Hartnell

ALIGILO : SESA INTERNACIA LITERATURA FORUMO EN POITIERS

7

KRINO KAJ FANTASTO EN ESPERANTO-LITERATURO
DE LA 30.04 ĜIS LA 3.05.1987.

PO PERSONE: 465.- TRAJNVOJAĜO ROUEN-POITIERS (IR-REVENO, 2A K.): 440.-
(KIUJ DEZIRAS ĈESTI NUR PARTON, NIN KONTAKTU PRI LA PREZO.)

NOMO K. ANTAŬNOMO K. ADRESO:

NOMBRO DA PARTOPRENANTOJ:

NOMBRO DA TRAJNBILETOJ:

MI PAGAS 465 x _____ = _____.-
440 x _____ = _____.-
ENTUTE-.

ALIGILO KAJ PAGO SENDOTAJ ANTAŬ LA 21A DE MARTO 1987A AL:

GRUPE ESPERANTO REGION ROUENNAISE, 43 RUE DESSEAUX, 76100 ROUEN.

MI DEZIRAS RICEVI INFORMOJN PRI LA SOMERRESTADO EN KULTURA CENTRO
ESPERANTISTA, LA CHAUX-DE-FONDS, KAJ VOJAĜO EL ROUEN: ()

EKZAMENOJ

Laŭ la informo de FRANCA ESPERANTU-INSTITUTO sukcesis la ekzamenojn:

ATESTO PRI LERNADO: GRAMOND Marcelline (TB)

ROBBES Elisabeth (TB)

ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO:

GRAMOND Marcelline (B)

ATESTO PRI KAPABLECO:

DUBOURG Pascal

Sincerajn gratulojn al la sukcesintoj! Ni esperu ke venontjare sin
prezentos multe pli da kandidatoj!

*Ekzamenssesio (1a, 2a kaj 3a gradoj)
okazos en Rouen la 16 k. 17ajn de majo. Petu aliĝilojn kaj informilon
pri tranokteblecoj de Rouen-esperanto, 43 rue Desseaux, 76100 ROUEN.
Okazos antaŭ samtempaj lingvo-kursoj kaj pretia-ekzercadoj.*

ABONREVUO

8

Por subteni esperantistajn asociojn kaj por praktiki, jen listo de kelkaj abonindaj revuoj:

<u>FRANCA ESPERANTISTO</u> (kunkotizo UFE)	195,-
<u>ESPERANTO</u> (kunkotizo UEA)	200,-
<u>MONATO</u>	175,-
<u>EL POPOLA ĈINIO</u>	1 jaro 90,-
	2 jaroj 150,-
	3 jaroj 210,-
<u>HEROLDO DE ESPERANTO</u> (18 foje jare)	110,-
abonu ĉe UFE, 4bis rue de la Cerisaie, 75004 PARIS. CCP 855.35 D Paris	
<u>SAT-AMIKARO</u> (kun kotizo)	110,-
abonu ĉe A.SADIER, 22 av. Couturier, 93000 BOBIGNY. CCP 7658.05 C Paris	
<u>SENNACIULO</u> (kun kotizo SAT).....	190,-
abonu ĉe SAT, 67 av. Gambetta, 75020 Paris. CCP 1234 22 K Paris	
<u>KULTURAJ KAJEROJ</u> (Kastelo Grésillon)	60,-
abonu ĉe P.BABIN, 13 bld. de la Chauvinière, 44300 NANTES	
CCP 2813 61 L NANTES	
<u>LITERATURA FOIRO</u>	145,-
abonu ĉe S.BUURUT, 15B rue Payan, 10000 TROYES, CCP 2822 IO S Toulouse.	

VENONTAJ BULTENOJ

Vi sendu viajn artikolojn kaj komunikaĵojn al Annie GAILLARD (vidu adreson ĉe la fronta paĝo)

- fine de marto por apero fine de aprilo 1987. (n°157 kun informoj pri la ĝenerala kunveno)
- fine de junio por apero meze de septembro 1987. (n°158)
- fine de novembro por apero fine de decembro 1987. (n°159)
- (ĉi-tiu bulteno estos rezervata por raporto pri la ĝenerala kunveno).
- fine de februaro por apero fine de marto 1988. (n°160)

NORVEGIO

ĈEFURBO (OSLO)

9

Ne necesas esti leterportisto por scii ke Oslo estas ĉefurbo de Norvegio. Sed jam estas problemoj se oni demandas kiujn aliajn urbojn havas Norvegio aŭ kiuj landoj najbaras ĝin.

Kompreneble kvar milionoj da loĝantoj por iu lando kiu surfasas kiel du trionoj de Francio estas maldensata terpeco. Sed kiam 70% de la norvegoj vivas en urboj oni ne povas eviti mencii Bergen, la duan urbon, tradicia okcidenta komerccentro; Stavanger, suda kraftindustria urbo; Trondheim bela universitata urbo, 600 kilometroj norde de Oslo kaj Tromsø kiu, kun 45000 enloĝantoj estas la plej granda norda urbo de Norvegio (2000 km de Oslo). Ĉiu jam aŭdis pri la noktomeza suno sed kiu pensas ke, en Tromsø, vintre, ne aperas la suno ĉe la horizonto dum du monatoj.

Kio karakterizas Norvegon? Multe estas por diri. Geografie, maro, nordo kaj montaro kuniĝu tiel ke Norvegio estas samtempe la plej norda eŭropa lando, la plej malebena kun nur 3% de la lando kultivebla kaj la plej milda laŭ temperaturo ĉe la marbordo ĉar dank'al la Golf Stream neniu glacio blokas la novegajn havenojn.

Socie, ĝi estas same surpriza kiel geografie. Du oficialaj lingvoj por tiom malmulte da parolantoj: Bokmål kaj Nynorsk. Se mi dirus ke ke temas pri la sama lingvo kun variaĵoj mi ne estus tre malproksima de la realeco sed mi malkontentigus kelkajn norvegojn. Pli da virinoj ol da viroj en la nuna registaro ankaŭ montras le nekutimecon -por ni- de tiu mando kiu ne multe diferenças laŭ la socialaj reguloj, de sia najbaro Svedio. Sed se la virinoj pli egalas la virojn ol ĉe ni, kiu pretigas la tagmanĝon demandas sin la bonapetita franco, ne gravas, vere, ĉar terpomoj kaj fiŝo post dekkvin minutoj pretas kaj ĉiuj povas ĉetabliĝi por komune preni la ĉefan manĝon de la tago je la deksesma horo.

Ĉar ankaŭ tio estas specifa al Norvegio (kvankam iom validas por Svedio) deŭra labortago por ĉio de oka ĝis la dekkvina kaj ducna aŭ deksesma horo por fabrikoj, bankoj aŭ magazenoj. Posttagmeze (komprene post la deksesma) ĉiu butikoj estas fermita kaj la Norvegojn, oni povas renkonti aŭ hejme aŭ en la naturo, kurantajn, biciklantajn, naĝantajn aŭ vintre skiantajn, ĉar ĉiu norvego "naskiĝas kun skioj" akj en Tromsø aŭ en Oslo, ne malofte vidiĝas norvegoj kun rulskioj surstrate meze de julio! Sporta kaj sana norvego kiu ne drinkas,

- certe ne eblus kun tiom malmulte da trinkejoj kaj tiam da halperresoj por vendi aŭ servi alkoholaĵojn -preskaŭ ne fumas- aŭ skrupule respektas la ŝildojn- ne nervoriĝas en aŭtoj;

.../...

- neniam publike kriĉas... sed neniam ĵetas sin sur ŝatatan personon delonge neviditan ! Ĉu konsekvenco de la klimato aŭ de la luterana printaneco kiu karakterizas svedojn kaj norvegojn ?

Hiĉa, Norvegio kiel ĝiaj enloĝantoj ŝajnas realigi la francan proverbon: por vivi feliĉaj, ni vivu kaŝitaj. Tamen, se vi volas malkovri ilin, vi tuj komprenas ke, se ili estas norvegecaj, ili ne rifuzas komuniki kun vi en la angla aŭ la germana kiujn ili pli bone regas ol iu ajn franco. Sed finfine, laŭ mi, la plej bonajn kaj agrablajn kontaktojn vi havos en la naturo mem. Tie vi povas libere kaj tutlaŭleĝe sovaĝe tendumi kaj verŝajne tio estas ankau la plej bona solvo se via monujo ne plenplenias - kiel la salajroj, la vivkostoj en Norvegio estas tre altaj, kvazaŭ la duoblo de la francaj prezoj -

"HVURUEN ER DU DET? BRA, JEG VAR TU UKER I NORGE!"

vi povos diri post dudektegoj en la lando de la fjordoj de la alkoj kaj de la neĝo.

Nu, atendu, antaŭ ol aĉeti la trajnbileton, mendu la senpagan kaj bele dokumentitan broŝuron "NORVEGUJO" eldonita de la reĝa norvega ministerio pri eksteraj aferoj - ĉe norvega esperanto-ligo, Ulf Schous v. 18, N-0572 OSLO S.

Claude ROUGET.

ILI DEZIRAS KoresponDI kun NORMANDANOJ:

- ABRONOVVA Julia
SU-198904 LEVINGRAD
Staryj petergof
ul. botanicejkaĵa 66/2
Obzeritie n.5
Studentino 20-jara . Intereso: lingvoj, muziko, tenis.
- SAMOHVALA Juri
Bogatkova 193.6
Novosibirsk 17
SU-63007
komputilingeniero 27-jara.
- KYOKO HASEGAWA
3-36-I Minomiya -cho naka mura- ku
NAGoya-SHI AICHI -KEN
JAPANIU 453.
mezlerantino 15-jara komencantino pri esperanto.

Okaze de la jara kunveno en PORT BAIL, ni vizitis tre malnovan baptadon, kiu estas unika en FRANCIO. Ĉi sube, vi legos kelkajn klarigojn pri tiu rara kuriozaĵo.

De post unu jarcento, novaj hazardaj trovaĵoj pruvis ke, sur la teritorio de PORT BAIL, stariĝis, en la gallo-romana epoko, grava loĝantaro, kies centro ŝajne situis kie troviĝas nuntempe la vilaĝeto SANKTA MARKO. Tamen la ĉirkaŭaĵoj etendiĝis ĝis LANQUETOT. Tie estis konsekrita fonto, kiu ankoraŭ ekzistas. En 1951, purigante ĝin, oni trovis malnovajn monerojn kaj patronajn statuojn (nun konservitajn en la urodomo de PORT BAIL). Kvin romiaj vojoj konverĝis al tiu domgrupo. Ĉu eblas, ke la jarcentoj forgesis ties nomon? Komence de la lasta jarcento, Karlo de GERVILLE hipotezis, ke ĝi estis la enigma "GRANNONUM", ĝia nun ankoraŭ ne kontentige identigita kaj kiun la "NOTITIA DIGNITATUM" (fine de la IV-a jc., komence de la V-a jc.) citas inter la sidejoj de militistaj komandejoj aranĝitaj ĉe la marbordoj de Maniko. De post kvindek jaroj, la arkeologoj ne plu akceptas la hipotezon de GERVILLE. Tamen la ĵus trovitaĵoj en PORT BAIL meritas plifundan ekzamenon de la problemo. Necesus, por klarigi tiun tiklan punkton sisteme fosi la siton de la gallo-romana urbo. Eble oni trovos subskribojn pri ties nomo.

*

En la printempo 1956-a, oni malkovris, je 150 metroj birdfluge nordoriente de la praĝejo Nia Sinjorino, la postrestaĵojn de antikva baptado kun baĝejoj, restas nur la malalta parto de la eksteraĵ muroj, kelkaj eroj de slaboj, la bapteja naĝejo kaj la akvotuboj por al/elvenigi akvon.

La konstruaĵo estas sesangula kun absidetoj malfermiĝantaj al nordokcidenta kaj sudokcidenta flankoj. La eksteraĵ muroj, dikaj je 50 centimetroj, konsistas el ŝtonoj zorgeme tajlitaj kaj arigitaj per bonega mortero el kalko kaj marsablo, kun eroj de pistita briko. La longeco de la muroj varias, eksterne de 4,80 m ĝis 5,20 m. La planko estas el mortero kiu, pro granda enteno de pista briko, aspektas ruĝa. Sur la unua tavolo de tiu mortero, oni tendis platajn tegolojn kun randoj kaj sur la dua ripozis slaboj el skisto blua por formi la pavimon de la baptado. Oni povas vidi unu el tiuj slaboj sur la vertikala faco de la ŝtupo obliĝanta iri en la konstruaĵon.

Ankaŭ la banejo estas sesangula: la longeco de la flankoj varias ekstere de 1,20 m ĝis 1,50 m. Fosita en la roko, ĝi konsistas kiel la grundostuko el tavoloj supermetitaj el ruĝa mortero kaj plataj tegoloj. Slaboj el blua skisto superŝutis la tuton. Pluraj el ili estas konservitaj. Oni devas admiri la grandan lertecon kun kiu ili estis tranĉitaj, kunligitaj, poluritaj. En la baptadoj de la mediteranea regiono, la marmoro estas la materialo la plej uzita por la sama uzo. Ĉi tie, la blua skisto, la marmoro estas la materialo la plej uzita por la sama tekniko alie uzita por marmoro. Materialo trovita surloke, estis traktita per la sama tekniko alie uzita por marmoro.

La flango de la banejo estis iam pli alta ol nun. Oni povas vidi la lokon, kie sin tenis la episkopo por bapti la katekizaton starantan en la akvo.

La akvo alvenis el sudoriento aŭ per fonto, aŭ per akvodukto. Dume de fosaĵoj en 1956, la tubaro, kiu ĝin alvenigis, estis liberigita laŭlonge je 50 m. Tiu akvotubo, je la alveno en baptadon, mallarĝiĝas kaj sekvas deklivon sufiĉe grandan. Pro tio, la akvo ŝprucas en la banejon. Oni scias ke, en la paleokristanaĵ baptadoj, tiu impresio pri ŝprucado de l' akvo baptata estis dezirata referenco al la simbolismo de "vivanta fonto".

Drenputo, kiun oni ankoraŭ vidas apud la banejo, kun kiu ĝi komunikigas per faŭko garnita per plumbuto, obliĝis, en la baseno, konstantan akvonivelon; unu parto de la baptata akvo sorbiĝis de grundo, la drenputo estante masonita nur sur tri el siaj flankoj; la resto elglitiĝis per tubaro, kiun oni povas ankoraŭ nun vidi alirante okcidenten: ĝi devenis el la supra parto de la drenputo.

Estis, kiel kutime, du pordoj en la baptado. En la unuaj jarcentoj de la kristana erao, la baptado estis donita nur de la episkopo, kaj unu fojon en la jaro: tio estas en la Paska nokto; pli malfrue, la nombro de la baptitoj iĝanta pli granda, oni baptis ankaŭ en la Pentekosta nokto. La kandidatoj al baptado alvenis unuope tra la malgranda pordo, kiun oni vidas en la sudokcidenta muro. Ili senvestiĝis - eble en unu el la absidetoj -, en la banejon malsupreniris du aŭ tri ŝprucarojn, kiuj verŝajne estis taŭgaranĝitaj, kie oni vidas nun breĉon de la randaĵo. Poste, iĝante kristanoj pro baptado, vestitaj per blanka robo, ili eliris procesie tra la granda pordo al kiu direktis la vestiblo divenebla ankoraŭ nun.

.../...

.../... Kiam oni ne plu baptis ordinare mergobapte, la baptejo troviĝis senmotiva. De kia dato? Estas malfacile precizigi tion: eble inter la VIII-a jc. kaj la X-a jc. Nia konstruaĵo iĝis tiam funebra kapelo, sub patronado de Sankta Mikaelo: sufiĉis por tio plialtigi iom la plankon kaj superŝuti la banejon. Tiomomente estis en PORT BAIL monaĥejo kaj hospitalo; tiu lasta havis sian propran tombejon, kiu etendiĝis de la vojo preteriranta nun la sportoterenon. Ĝis la supro de l' teramaso, kie troviĝas la baptaĵo. Kiam en la XII-a jc. la hospitalo malaperis, ĝia tombejo estis aldonita al la paroka tombejo (kiu etendiĝis laŭ la maro, norde de la preĝejo Nia Sinjorino), sed dum Mezepoko oni daŭre nomis ĝin "tombejo de l' malsanuloj". En 1956, oni malkovris malproksima de la baptejo, nombrajn sarkofagojn kun ostoj. Aliajn oni trovis, okaze de laboroj faritaj je diversaj datoj, sur la tuta tereno de la malnova "tombejo de l' malsanuloj".

Fine de la XVII-a jc., la loĝantoj en PORT BAIL ne plu havante monon (aŭ deziron) konservi en bone stato la kapelon Sankta Mikaelo (kiu estis pro tio en tre malbona stato) estis devigataj laŭ ordono de la arkidiakona aŭtoritato detruji ĝin. La materialoj estis tiam uzitaj por solidigi la preĝejon Nia Sinjorino. La eks-baptejo metodike estis eldetruita: tiamaniere oni povas klarigi la nunan aspekton de ĝiaj muroj.

*

Se oni konsideras ke la materialoj, kiujn oni uzis por konstrui la baptejon, estas gallo-romane devenaj (brikoj, tagoloj jam antaŭe uzitaj) aŭ fabrikitaĵ laŭ gallo-romanaj metodoj (ruĝa cemento), oni devas konkludi, ke tiu konstruaĵo datiĝas de la fino de la Antikvaj Tempoj aŭ de la komenco de Mezepoko.

Sed tia konkludo ŝanceliĝas multe da konceptaĵoj konsiderataj kiel veraj de Arkeologio kaj de Historio.

Pri arkeologio. Oni ne konas en Francio iun ajn sesangulan baptejon. Sed certe la plimulto de tiuj monumentoj malaperis. Tiu ĉi de PORT BAIL estas la sola, kiun oni konas norde de la riverago LUARO. Plie, en neniuj el paleokristanaj baptejoj, jam konataj, la banejo havas la saman forton kiel la konstruaĵo. Oni trovas tiun samcentran planon nur pli malfrue, ĉefe en Italio, en postaj baptejoj, je la XI-a jc. Sed ne estas eble datumi tiel malfrue la konstruadon de la baptejo en PORT BAIL.

Pri historio. Dum la unuaj jarcentoj de nia erao, nur la episkopo donis la bapto-sakramenton. Pro tio, la baptejoj troviĝis nur en urboj, kie restadis pontifiko. Tamen oni konas kelkiujn apud basilikoj starantaj sur la tombo de sanktulo, kaj kiuj iĝis abataj preĝejoj: ST MARTIN DE LIMOGE, ST MAURICE d'ANGAUME, ST MARTIN de TOURS, SAINT MAURILLE d'ANGERS...

Cu PORT BAIL estis episkopa restadejo? Ne estas neeble, kvankam neniuj dokumentoj pruvas tion. COUTANCES, je la fino de Antikvaj Tempoj, estis nur tre malgranda vilaĝo. La gallo-romana urbo, kiu antaŭis PORT BAIL, estis certe multe pli ampleksa. Ĉi tiam estis grava marhaltejo inter orienta Mediteraneo kaj Britaj Insuloj (komerco pri bizancaj granoj kaj brita stano). Pro tio, kredeble, ekzistas hospitalo. De la VIII-a jc. PORT BAIL estis nomita en iu dokumento "EMPORIUM", t. e. grava vendejo. Estas do imagebla, ke la unuaj episkopoj, kies sidejo estis poste (ekde la VI-a jc.) fiksita en COTENTIN, havis tie duan rezidejon. Oni ne povas ne hipotezi, ke PORT BAIL estis sidejo de efemera episkopejo. Tamen la ekzisto de la baptejo povas rilati al tiu de monaĥejo el kiu PORT BAIL estis dotita. Oni trovis lastjarcente, tre apude de la preĝejo Nia Sinjorino, spurojn pri konstruaĵoj, kiuj, laŭ ne precizaj priskriboj nin atingintaj, devis esti samtempaj kiel la baptejo. Tie stariĝis verŝajne la abatejo.

Tiel PORT BAIL estintus tre frua centro pri kristana vivo, eble la unua en COTENTIN. Haveno por halto sur granda markurso, kial ĝi ne estus ricevinta misiistojn alvenintajn rekte el oriento? Oni trovas sur la teritorio de la komunumo kapelon dediĉita al Sankta SIMEONO la stilisto: oni ja scias, ke la kulto de tiu sanktulo (mortinta en 459) atendiĝis liatempa ĝis la limoj de Okcidento kaj notinde ĉe la kristanoj de Britaj Insuloj.

.../...

Aliaj hagiografiaj tradicioj firmigas tiun hipotezon pri kristanaj subtenadoj elvenintaj rekte el SIRIO en COTENTIN. Ankaŭ influoj de kelta monarkismo estas eblaj. Dokumentoj mencias, ke misiistoj venis en la VI-a jc. el Britaj Insuloj en COTENTIN aŭ en Manikajn insulojn. Ĉu eble tiu evangelia agado fontis pli frutempe ? la neordinara strukturo de la malnovaj paroĥoj de PORT BAIL kaj GOUET (kunligitaj en la XIX-a jc.) kun iliaj preĝejoj tute ekstercentraj ne estas sen memorigi sufiĉe oftan tipon en la okcidento de Britaj Insuloj.

tradukis s-ro Pierre ROBIOLLE.

NEKROLOGO

Ni ĉiuj estis indignataj pro la sovaĝaj atencoj okazintaj en Parizo antaŭ kelkaj monatoj. Tiuj atencoj terure kripligis kaj mortigis senkulpulojn kaj eĉ infanojn. Kondamnindaj estu tiuj kiuj ĵetis bombon en magazenojn sed kondamnindaj estu ankaŭ la ŝtatestroj kiuj vendas armilojn al fanatikuloj. Tiuj ŝtatestroj ne hezitus ankau ordoni ŝetadon de bomboj super plienhomajn urbojn.

Inter la viktimoj estis samideano bone konato de multaj normandaj esperantistoj ĉar li partoprenis kelkajn ĝeneralajn kunvenojn de UNE, nome s-ro BASTUNG, bofilo de niaj geamikoj ANGENAULT. Li mortis post pluraj semajnoj de suferado. Ni kondolencas la tutan familion kiu travivis tiujn dolorigajn momentojn.

Ni eksciiis pri la forpaso de s-ino MICARD, la dudekokan de decembro 1986a en Caen.

Por multaj esperantistoj, tiu nomo estas algluita al la kastelo de GRESILLON, pri kiu fieras la franca samideanaro (kaj sendube multaj eksterlandiaj esperantistoj).

Efektive, tiu konkretigo de esperantujo estis kreaĵo de gesinjoroj MICARD:

Inter la jaroj 34-39 s-ro Henri MICARD organizis somerajn lernejojn por instrui la lingvon al siaj kolegoj instruistoj.

En jaro 1951, li proponis aĉeton de domo tiucele; Ĝi kalkulis ke sufiĉus trovi 600 personojn kiuj konsentus pruntedoni 10000 frankojn tiamajn.

La 16an de septembro 1951, fondiĝis la kultura asocio de kastelo Gresillon.

Post multaj klopodoj por trovi taŭgan domon kaj ... monon, la kastelo estis aĉetita; la kaso estis malplena... la domo ankau: por la inauguro dum aŭgusto 1952 la vizitantoj devis kunporti siajn lito tukojn, kaj dormi en pruntedonitaj litoj.

En 1953, loterio permesis ekakiri meblojn.

La esperantista popolo devas konscii pri tio:

Kiom da sindonemo, persista laborego estis necese por certigi la sukcesan rezulton!

La kooperativo de Literatura Foiro invitas vin al la

Sejna Esperanto-Rendevuo

**apud Troyes, Francio
en Mesnil-Saint-Père
Centre Yvonne Martinot**

3 -5 aprilo 1987

**sekretario:
Suzanne Bourot
15/B, rue Morel-Payen
F-10000 Troyes
telefono: (25) 812 651**



La Sejna Esperanto-Rendevuo estas jam tradicio, iniciatita en 1982 de LF-koop, kaj organizata de Societo Yvonne Martinot, kunlabore kun Centre Espérantiste de l'Aube.

Eksperimente, la Rendevuo prezentos tri grupojn: por progresantoj, kun konversacio kaj praktikaj ekzercoj, sub la gvido de Pierre Babin (grupo B); por E-parolantoj, kun eksterlanda preleganto, Walter Ŝelazny, pri Zamenhof (grupo C, omaĝe al la Jubilea Jaro), por aplikantoj de la internacia lingvo, pri informadiko, sub la respondeco de François Lo Jacomo (grupo D).

Ankaŭ la komuna vespero estos alia ol kutime: komuna konsultiĝo pri la rolo de LF-koop, nome SYM kaj La Kvinpetalo en Francio, sub la kunordigo de Giorgio Silfer; poste, liberaj babiloj. Tio donos la eblecon profundigi la reciprokajn konatiĝojn.

KOTIZOJ: 85,- (studentoj: 60,-)

TRANOKTOJ: 55,- (en 2, 4 aŭ 5 litaj ĉambroj)

VESPERMANGO: 55,-

TRI MANGOJ TAGE: 105,- (kun kafo-pauzo)

**PRINCIPALES RECOMMANDATIONS, RESOLUTIONS ET PROPOSITIONS DE LOIS
EN FAVEUR DE L'ENSEIGNEMENT DE L'ESPERANTO**

L'espéranto a fait l'objet de recommandation de la part d'organismes internationaux, d'assemblées, d'organisations et de nombreuses personnalités, notamment en :

- 1906 - Congrès de la Confédération Générale du Travail (Amiens)
- 1911 - Premier Congrès International des Races (Londres)
- 1920 - Congrès Universel de l'Union Mondiale des Associations Internationales (Bruxelles)
- 1921 - 10ème Conférence Internationale de la Croix-Rouge (Genève)
- 1922 - Conférence Internationale de Genève sur l'enseignement, organisée au secrétariat de la Société des Nations par l'Institut Jean-Jacques Rousseau
- 1923 - Conférence Internationale des Chambres de Commerce, des Foires et des Offices de Tourisme (Venise)
- 1924 - Conférence préliminaire pour une entente Internationale en Radio-Téléphonie (Genève)
- 1924 - American Radio Relay League
- 1924 - Académie des Sciences (Institut de France), vœu signé par 42 savants
- 1925 - Union Télégraphique Universelle (l'espéranto est accepté comme langage clair suivant une recommandation de la SDN, la même année; décision confirmée en 1958, à Genève)
- 1925 - Premier Congrès International de la Radio
- 1927 - Union Internationale de la Radio
- 1931 - Union des Foires Internationales, Congrès International de Bordeaux
- 1931 - Assemblée des Présidents de Chambres de Commerce
- 1932 - Syndicat National des Instituteurs (Congrès de Clermont-Ferrand)
- 1937 - Syndicat National des Instituteurs (Congrès de Paris)
- 1946 - Congrès International de l'Education Nouvelle (Paris)
- 1954 - Conférence Générale de l'UNESCO (8ème session, Montevideo, Uruguay)
- 1966 - Union Européenne des Travailleurs Aveugles (Bruxelles)
- 1972 - Conseil National des Femmes Italiennes (33 organisations regroupées), Milan
- 1975 - Congrès International des Citoyens du Monde (San Francisco)
- 1985 - Conférence Générale de l'UNESCO (23ème session, Sofia, Bulgarie)

la cotisation
l'association).

F.	70,00 F. (*)
F.	220,00 F. (*)

moins de 18 ans
andeurs d'emploi

tre chèque au
on ci-contre,
du :
GION ROUENNAISE"
2.A. ROUEN.

plus tard,
stage à :

ION ROUENNAISE
100 R O U E N.

PRÉVOIR :

1" :

s :
: 36,00 F.
extes et exerci-
és.

: 47,00 F.

X 2 et 3" :

on: 30,00 F.

:

à la Cafétéria
à partir 30,00 F.

di 3 plats au
n : 52,00 F.

de pizza
: 30,00 F.

====

STAGES ESPERANTO

14 ~ 15 février


14 ~ 15 mars

11 ~ 12 avril

16 ~ 17 mai

1987

la langue internationale



rouen

76100

__ maison des jeunes __

objectifs :

COURS DE NIVEAU 1 : Débutants.

Ce cycle de 4 stages a pour objet de vous familiariser avec l'Espéranto, en étudiant l'essentiel de la grammaire, les 500 racines les plus fréquentes, vous permettant, grâce à la combinaison d'éléments invariables de posséder plus de 2000 mots et expressions, et d'acquérir une maîtrise suffisante de la langue pour vous exprimer simplement.

Entre chaque stage, possibilité de correction par correspondance des exercices des leçons étudiées lors des cours intensifs.

COURS DE NIVEAUX 2 ET 3 :

Perfectionnement et conversation.

Ces deux cours vous permettront de compléter l'étude de la langue. Ils vous entraîneront à l'emploi du vocabulaire et des nouvelles structures grammaticales, ainsi qu'à un réemploi systématique des structures étudiées au niveau 1. Un test de niveau sera effectué en début de stage.

Il sera toujours possible de changer de cours pendant le stage si vous le désirez.

Exemple pour cours Niveau 1

dates :

- 14 et 15 février : Prononciation leçons 1,2,3.
- 14 et 15 mars (*) : Leçons 4,5,6.
- 11 et 12 avril : Leçons 7,8,9.
- 16 et 17 mai : Leçons 10,11, révisions.

(*) : Un nouveau cycle de 4 stages pour débutants sera organisé en parallèle avec les autres.
4ème stage en juin 87. les 13 et 14.

programme

LE SAMEDI :

- 14h00 - 14h30 :
- 14h30 - 15h00 :
- 15h00 - Début de de 1 heure, ent de 15 minutes.
- 18h30 - Fin des
- 19h00 - Repas p
- 20h30 - Soirée d'inform

LE DIMANCHE :

- 9h00 - 9h30 :
- 9h30 - Reprise même rythme : 2 et pause de 15
- 11h45 - Fin des
- 12h00 - Repas p
- 14h00 - Reprise même rythme : 2
- 16h15 - Fin des (Au total : 7 h
- 16h15 - 17h00 :

Pendant l'accueil service de librairie d'information sera Des boissons seront position.

lieu du stage

MAISON DES JEUNES
114 AVENUE DE BRE
76100 - R O U E N

organisateur

GRUPE ESPERANTO
ROUENNAISE. 43 RU
ROUEN. Association
1901, à but non l

(Les 16 et 17 mai : Session d'exams - 3 niveaux)

moyens pédagogiques

accueil des parti-
cipants.
information sur
le stage.
cours. 3 cours
coupés de pauses

- Cours par petits groupes.
- Manuels d'étude et d'exercices,
- Lexiques ...
- Important soutien audio-visuel
par transparents pour rétropro-
-jection, tableaux, cassettes
de prononciation et de lectures
chansons ...

cours.
en commun.
créative et
ion.

informations :

accueil.
es cours sur le
ours de 1 heure
utes.

Dès votre inscription (à envoyer
au plus tard 1 semaine avant la
date du stage à l'organisateur),
vous recevrez, par retour du cour-
-rier, les documents de stage
avec un plan de Rouen pour attein-
-dre la Maison des Jeunes, ainsi
qu'un programme détaillé.

cours.
en commun.
es cours sur le
ours et pauses.
ours.

es de cours).
plan du stage,
ot de l'amitié".

es pauses, un
et un stand
ouverts.
à votre dis-

situation :

La Maison des Jeunes est située
sur la rive gauche de ROUEN,
dans le centre ville, en face
du centre commercial SAINT SEVER
(Restaurants), au milieu d'un
jardin public.

A proximité immédiate de la Mai-
-son des Jeunes, vous trouverez :

- 1 Hôtel 2 **
- 6 Hôtels 1 *
- 1 Auberge de Jeunesse.

*Signalez nous si vous désirez
recevoir une documentation dé-
-taillée sur ces possibilités
d'hébergement. (Réservation à
la charge des stagiaires.).*

B :
DE LA CULTURE
NE,
RIVE GAUCHE.

autres inscriptions :

LA REGION
ESSEAUX 76100
Culturelle , Loi
ratif.

Si vous désirez inscrire d'autres
personnes à ces stages, veuillez
recopier ou photocopier le bulle-
-tin d'inscription, au verso, pour
chaque participant supplémentaire;

Cochez les mentions utiles
Remplir en caractères majuscules.

MONSIEUR ☐ MADAME, MADEMOISELLE ☐

NOM : _____

PRENOM : _____

ADRESSE : _____

CODE POSTAL :

TÉLÉPHONE :

AGE : PROFESSION :

LANGUES ÉTRANGÈRES ET RÉGIONALES

CONNUES :

S'INSCRIT AU STAGE DE NIVEAU 1 ☐

DE NIVEAU 2 : ☐ DE NIVEAU 3 ☐

POUR LES STAGES SUIVANTS :

- 14 ET 15 FEVRIER ☐

- 14 ET 15 MARS ☐

- 11 ET 12 AVRIL ☐

- 16 ET 17 MAI ☐

- 13 ET 14 JUIN ☐

JE DÉSIRE PRENDRE MON REPAS DU

SAMEDI SOIR OUI ☐ NON ☐

DIMANCHE MIDI OUI ☐ NON ☐

AVEC L'ENSEMBLE DES STAGIAIRES.

JE DÉSIRE UNE DOCUMENTATION SUR LES
POSSIBILITÉS D'HÉBERGEMENT À ROUEN

À L'HÔTEL ☐ À L'AUBERGE ☐
DE JEUNESSE

MONTANT DE MON INSCRIPTION _____

DATE : SIGNATURE : _____

prix : (Comprenant
annuelle à

PAR STAGE :	100.00
POUR LES 4 STAGES :	320.00

(*) : pour jeunes
étudiants, de

Prière de joindre v
bulletin d'inscript
rédigez le à l'ordr
"GROUPE ESPERANTO R
C.C.P. n° 2770.

Renvoyez le tout, a
une semaine avant l

GROUPE ESPERANTO RE
43 RUE DESSEAUX - 7
TEL. : 35.72.71.17.

A REGLER SUR PLACE

* - Pour le "NIVEAU

- Manuel du cou

"Metodo 11"

- Casette des

- ces enregist

(Facultative)

* - Pour les "NIVEA

- Manuels, envi

* - Pour les REPAS

- Le samedi soi

Saint Sever,

- Le dimanche m

choix, envi

ou possibilit

à partir de

==::==::==

1987

